Usona Esperantisto № 2022:1 (jan–feb)

Anoncoj
Nova albumeto de Vinilkosmo; Reveno de la filmfestivalo; Nova novelaro de Julian MODEST; NASK-2022; Experienced proofreader needed; Polyglot Gatherings; Reta trompo disiras; Listo de kandidatoj por 2022; ESF serĉas asistanton

Veo
senintenca esperantaĵo • Ray REDD
"Jen lueblaj elektraj bicikloj, eble por veturi al malfeliĉa evento."

Kaj-kaja antaŭeniĝo
de la prezidanto • Filipo DORCAS
Ne necesas elekti nur unu opcion. Eblas elekti plurajn per "kaj-kaja" pensmaniero.

De la estraro
Dumonataj raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Ŝikago, 2001
beletre • Jurij ANDRUĤOVIĈ, Viktor PAJUK
Rakonto de Jurij ANDRUĤOVIĈ, elukrainigita de Viktor PAJUK.

Ŝanĝo (aŭ ĉu sango?) en Portugalujo
vojaĝe tra la mondo • Brandon SOWERS
Imagu mian surprizon, kiam mi vidis skribitajn sur la giĉeto la literojn *SANGO*.

Eĉ naturaj lingvoj povas esti planitaj
informado • Joshua HOLZER
Kial lerni Esperanton, kiam oni povas uzi tiun tempon por lerni lingvon "naturan"?



Bimonthly expense report
de la centra oficejo • Vilĉjo HARRIS
Expense report from the Central Office for December and January.

Mikronoveloj
Du novaj centvortaĵoj.

La vivo de Peĉjo
ŝercoj • Timothy BORONCZYK
La dek-naŭa en serio de Timothy BORONCZYK.

Raporto de la meza regiono
loke • Peggy DOLTER
Virtuala Bankedo en Sankta-Luiso.

Esprimoj kun redundaj, superfluaj sinonimoj
traduku! • Hoss FIROOZNIA
Ĉi-numere ni tradukas el la angla en Esperanton. Ni prezentas respondojn al la defio de Arthur C. CLARKE.

Anoncoj

Nova albumeto: *Veko*

En Januaro de Vinilkosmo aperis *Veko*, ses-titola albumeto de la brazila rokbando *BaRok-Projekto*. Jen kiel priskribas ĝin la eldonejo:

> *Veko* estas pli matura kaj kohera laboro, kaj muzike kaj lirike, kie la grupo montras sian intimecon kun la muzikstilo kaj virtuozecon de siaj komponaĵoj. La tradicia miksaĵo de Folklora kaj Potenca Metalo kun klasika muziko estas pli riĉa kaj peza en ilia nova eldono. La sociaj kritikoj kiuj estis prezentitaj en la antaŭa albumeto nun atingas novan nivelon, pripensante la tradiciojn de la indiĝenaj popoloj kaj la rolon, kiun iliaj batalantoj ludas por la supervivo de sia kulturo meze de teknologia progreso kaj la invado de sia teritorio.

Pliaj detaloj, inkluzive de elŝuteblaj provekzempleroj `<https://bit.ly/3HuQDkG>` haveblas en la retejo de Vinilkosmo.

Reveno de la filmfestivalo



La Usona Bona Film-Festivalo revenas! Sendu viajn filmojn al ni antaŭ la **1-a de Majo, 2022**. La filmoj devas esti malpli ol kvin minutojn longaj, tute en Esperanto, enhavi almenaŭ dek unikajn vortojn, kaj enhavi ian videblan horloĝon aŭ brakhorloĝon. Estas nenia kotizo por partopreni, kaj vi povas gajni ĝis $700!

Vidu nian **filmfestivalan paĝon** `<https://esperanto-usa.org/eusa/film_festival/>` por legi la regulojn. Ĉe la sama paĝo vi trovos **la ekzemplan filmon *Ĝenaj Ĝemeloj*** `<https://youtu.be/rv4Kyny5q2Y>`, kiu sekvas tiujn regulojn, kaj ankaŭ ligilojn al la filmoj de la pasintjara festivalo.

❧ ❧ ❧

The American Good Film Festival has returned! Send us your films by **May 1, 2022**. The films need to be under five minutes long, entirely in Esperanto, contain at least ten unique words, and include a visible clock or watch. There's no fee to enter, and you can win up to $700!

See our **Film Festival page** `<https://esperanto-usa.org/eusa/film_festival/>` for the full rules. On the same page you'll find **the example film *Ĝenaj Ĝemeloj*** `<https://youtu.be/rv4Kyny5q2Y>`, which follows those rules, and links to last year's films.

La fera birdo

Aperis nova novelaro de la konata verkisto (kaj nun akademiano) Julian Modest. La eldonisto priskribas ĝin jene:

> Ĉiu rakonto en *La fera birdo* estas metaforo, kiu impresas per perfekta lingvo, eleganta stilo kaj filozofia sugesto. Modest spertas vidi kaj bilde priskribi ordinarajn heroojn kaj okazintaĵojn, kiuj igas nin mediti pri la senco de la vivo, pri la homa ekzisto, pri la ĝojoj kaj ĉagrenoj, kiuj akompanas nin.

Eblas aĉeti la libron kaj papere kaj bite de la **eldonejo *Libera*** `<http://eldonejolibera.be>`.

NASK-2022

NASK—the US Summer Esperanto Program—is open for enrollment for the 2022 courses.

There will be a virtual course in March, taught by Jorge Rafael Nogueras, designed to prepare people for in-person events like the UK and NASK in Raleigh, and the summer program will offer three levels of instruction in a 5-day residential format:

- Post-Beginner with Karina Oliveira
- Intermediate with Hans Becklin
- Advanced with Tim Owen

Dates of instruction will be July 4–8, 2022, with student arrival on Sunday, July 3, and departure on Saturday, July 9.

Course descriptions, registration information, and payment options are all available at **the NASK website** `<https://nask.esperanto-usa.org>` and **ESF** `<https://esperantic.org/en/nask-2022-1/>`.

❧ ❧ ❧

NASK – la Usona Somera Esperanto-Kursaro – estas malfermita por aliĝo por la programo de 2022.

Okazos virtuala kurso en Marto, kun Jorge Rafael NOGUERAS, kies celo estos pretigi homojn por ĉeestaj eventoj kiel la UK kaj NASK en Raleigh. Kaj la ĉeesta somera programo prezentos tri nivelojn de instruado en kvin tagoj:

- Post-baza kun Karina OLIVEIRA
- Meza kun Hans BECKLIN
- Supera kun Tim OWEN

Lecionoj okazos 4–8 Julio. Lernantoj alvenos dimanĉon, la 3-an de Julio, kaj foriros sabaton, la 9-an de Julio.

Kurs-priskriboj, informo pri aliĝado, kaj elektoj por pago estas haveblaj ĉe **la NASK-retejo** `<https://nask.esperanto-usa.org>` kaj **ESF** `<https://esperantic.org/en/nask-2022-1/>`.

Proofreader needed

Reader Timothy Wand writes:

> I have written a book. It needs to be reviewed by a sex therapist. One of the main characters is a sex therapist. I need to know that the dialogues are something a therapist might say. This is not porn. I would like to send a copy to a knowledgeable Esperanto speaker to see if it is worthy of publishing. It's not a great American novel. It is a short book. I have prostate cancer. I don't know how long I have left. The doctor says perhaps fifteen years. I would like to do something with this before I go. Is there someone who can help me?

Timothy can be reached at txw304@yahoo.com or 816-217-3973.

Polyglot Gatherings

A Focus of the E-USA Publicity Committee

Will Morton, the chair of the promotion committee, is a regular at polyglot gatherings, in person when possible and lately on-line. Will realized that many polyglots may have heard of Esperanto but don't know much about it. So, why not add an Esperanto breakout room, which was gladly done by the organizer.

Promoting Esperanto to polyglots seems a logical decision. Polyglots love to learn languages, are looking for a community of speakers to practice with and can easily learn Esperanto.

Alert! Will needs your help.

You likely got a nice invitation from the Central Office inviting you to participate in an on-line polyglot meeting. Esperanto speakers are needed to hang out in the Esperanto room speaking Esperanto, introducing Esperanto using prepared material and answering questions. With five or six Esperantists participating, it is possible for some participants to leave the room for a while to visit other language rooms.

Whether you are a "polyglot" or a "polynot" you are welcome at the polyglot meeting.

Please plan to join a meeting when you can and be part of a fun way to promote Esperanto.

— *Chuck MAYS <chuck.mays@esperantic.org>*

Reta trompo disiras

Stefan MacGill atentigis nin pri la jena:

> Disiris lastatempe klare trompa mesaĝo, tamen en flua Esperanto. Ĝi invitas anoncadon de projektoj de unuopuloj (ne organizoj) por ricevi tre signifajn monsumojn. Ĝi petas bazajn informojn, sendube sekvus peto por ricevi viajn bankdetalojn. Se vi donus tiujn, atendu rapidan malplenigon de via konto! La du donitaj nomoj malantaŭ la skemo estas plene nekonataj al UEA. Disiras dua kazo en Afriko, en kiu Fejsbuka adreso estis kaperita. Mi supozas, ke esperantistoj devas ĝoji, ke eĉ malbonintenculoj trovas nian lingvon tiom uzata, ke indas provi nin trompi!

Raporto de la Nomuma Komitato

Jen la listo de kandidatoj por la ĉi-jara balotado de Esperanto-USA, unuanime aprobita de la Nomuma Komitato:

Por Sekretario:

- Charlotte Burton

Por Direktoro:

- Fred Meyer III
- Ruth Kevess-Cohen
- Enrique Haro Márquez
- Vince Allison
- Matt Brooks

Mi kore dankas al Amanda, Brandono, Myrtis kaj Markuso pro ties laboro en la Nomuma Komitato.

— Jorge Rafael Nogueras, Estro de la Nomuma Komitato

ESF serĉas asistanton

Evoluiga asistanto – part-tempa kaj dehejma

La Fonduso *Esperantic Studies Foundation* serĉas kandidaton por pagita, kontrakta posteno por helpi kun monkolektado. Ĉi tiu posteno postulas kompetentecon en la angla. Por sukcesi, oni devas legi kaj skribi Esperanton je baza nivelo. Flueco en Esperanto estas certa pluso. **Pli da detaloj ...** `<https://www.esperantic.org/eo/voluntulu/>`.

Development Assistant - Part-time, Work from Home

The Esperantic Studies Foundation is seeking a candidate for a paid, contract position to assist with fundraising. This position requires competency in English. To be successful, you need to read and write Esperanto at a basic level. Fluency in Esperanto is a definite plus. **More details ...** `<https://www.esperantic.org/en/volunteer/>`.

— Chuck Mays <chuck.mays@esperantic.org>

Veo

senintenca esperantaĵo • Ray Redd

Ray Redd fotis por ni la jenajn elektrajn biciklojn en Seatlo. Li komentis, ke eble ili estas “por veturi al malfeliĉa evento.” Aŭ eble ili tiel aĉas, ke luonto nepre eligos ĝemon.

Kaj-kaja antaŭeniĝo

de la prezidanto • Filipo Dorcas

Konsideru duflankajn demandojn.

"Ĉu ni manĝu en ĉina restoracio ĉi-vespere aŭ ĉu vi preferas meksikan manĝon?" Iu demandas pri du eblecoj.

- Ĉu loka grupo studu gramatikon dum la klubkunveno aŭ ĉu la grupo faru ion pli amuzan?
- Ĉu Esperanto-USA sendu poŝte la paperan bultenon *Usona Esperantisto* al la membroj, aŭ ĉu ĝi eldonu elektronike?
- Ĉu ni fokusiĝu en niaj internaj taskoj, aŭ ĉu ni doni atenton al internaciaj rilatoj kaj projektoj?
- Ĉu la estraro de Esperanto-USA laboru pri diskonigo al la ne-Esperanta publiko, aŭ ĉu ni donu la atenton al lokaj grupoj?

Ĉar ni ofte rimarkas la duecon de decidoj, ni ofte pensas en tiuj terminoj en nia planado kaj decidoj. Certe iuj demandoj estas de la kategorio "aŭ aŭ", sed multaj ne estas.

Ofte estas manieroj pensi pli inkluzive. Kiam ni alfrontas du opciojn, unu tento estas pensi laŭ limigita dueco, elektante unu aŭ la alian, kvazaŭ la elektoj estas reciproke ekskluzivaj. Ni estas tiel envolvitaj en tiu procezo, ke ni foje neglektas aliajn elektojn, eĉ kiam ili eblas. Tiel, anstataŭ pensi pri unu elekto aŭ la alia ekskluzive, ni povas pensi pri ambaŭ elektoj. Eble ni povas elekti prioritaton, kiu meritas la atenton, kaj ankaŭ sekvi la alian elekton kiam konvene.

Tiamaniere la Estraro de via Esperanto-USA antaŭeniras konsiderante ĉiujn ŝancojn kaj respondecojn, kiuj estas antaŭen. Ekzemple, ni ne nuligas nian paperan bultenon kvankam kelkaj membroj preferas la elektronikan formon. Ni ne volas forlasi iun. Kelkaj membroj aŭ ne havas aliron al la elektronika formo aŭ ili simple preferas paperon.

Pli vasta pejzaĝo de projektoj postulas pli da laboro kaj atento. Via estraro kreas pli da oportunoj por volontuloj kaj komisias taskojn. Kvankam estraranoj estas okupataj en la gvidaj roloj, ni bezonas vian helpon. Atentu anoncojn en *Usona Esperantisto* kaj nia *YouTube*-kanalo, la ĝisdatigojn kaj aliajn mesaĝojn senditajn retpoŝte, informon de via regiona kunordiganto, kaj niajn diskutojn en sociaj komunikiloj. Via helpo ebligos al Esperanto-USA antaŭeniri, ne ekskluzive elektante nian engaĝiĝon, sed pensante, ke ni povas fari kaj ĉi tiun projekton kaj ankaŭ la aliajn, en "kaj-kaja" pensmaniero. Ni antaŭeniras "kaj-kaje".

Filipo Dorcas

Filipo estas Prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

<**filipo@grupoj.org**>

De la estraro

Stipendioj por la UK

Charlotte estas Sekretario de E-USA. Oni povas kontakti ŝin ĉe liquidfireangel@gmail.com.

La Universala Kongreso alvenas al Nordameriko ĉi-somere! Registru nun por malpli altaj kotizoj! Ni ankaŭ tre ege ĝojas anonci, ke ni ofertas 100 stipendiojn al membroj de E-USA, kiuj estas junuloj kaj handikapuloj por partopreni en UK ĉe Montrealo!

Se vi volus partopreni kaj ne povas pagi la kotizojn, plenumu **la formularon** `<https://forms.gle/Q4zRejTfbqAAm8Zv8>` por peti stipendion. Ni povos pagi nur la registrajn kotizojn, ne la vojaĝon nek loĝejon.

Se vi scivolas, "Sed kiel oni povus pagi tiom da stipendion?" sciu, ke ĝi estas per la malavareco de membroj kiel vi. Kelkaj memoras, ke antaŭ du jaroj (ĉu jam du? ĉu nur du?) E-USA kaj ESF petis donacojn al donackampanjo "Esperanto in the USA." Tiutempe, ni promesis, ke la donacoj pagus stipendiojn por helpi junulojn partopreni eventojn, kaj pagus ankaŭ aliajn valorajn projektojn. Finfine, ŝajnas, ke ni havos nian Universalan Kongreson ĉi tie en Nordameriko, kaj ni tre volas, ke multege da junuloj kaj aliaj nordamerikaj esperantistoj povu partopreni sian unuan internacian kongreson de Esperanto! Venu kaj festu kun ni!

— Charlotte Burton, Sekretario

Financial Responsibility, … , Membership

Fred is one of the Directors of E-USA. You can contact him at f3meyer@gmail.com.

My focus during the past several months has been on several issues: financial responsibility, distribution of our newsletter, Special Interest Groups, and membership in E-USA.

While our Treasurer is responsible for receiving all Esperanto-USA income and payment of all our obligations, the Board is financially responsible for authorizing expenses. Fund managers appointed by the President manage expenditures from named financial funds. The board must be able to oversee all income and expense. Oversight by the board has improved during the past two years. The Board now receives a monthly statement of all expenses and a quarterly statement of income and expense. We still must exercise diligence reviewing these reports.

Up until now, full members of Esperanto-USA could elect to receive a paper copy of our newsletter, *Usona Esperantisto*. It was recently affirmed that this will continue to be the case. There is of course a cost of printing and mailing these copies. Esperanto-USA is committed to not leaving anyone behind as technology advances. Some people use paper mail, some email, and others use online apps like Slack and Discord for messaging. We will continue to communicate with all.

Esperanto-USA's Regional Coordinators met by Zoom on January 25. Besides discussing our activity during the prior several months, we talked about Special Interest Groups (SIG) and membership of members of local groups in Esperanto-USA.

My report in UE 2021:5 discussed launching the listing of SIGs on the E-USA website. In his President's column in issue 2021:6, Phil Dorcas discussed why Esperanto-USA is registering SIGs. At our meeting Regional Coordinators discussed ways to promote the registration of SIGs among members of local groups. To register, a SIG does not have to be newly formed. Existing SIGs that have an online presence on Facebook or some other social media, should also be encouraged to register.

Encouraging members of local groups to become members of E-USA was also discussed. Some Regional Coordinators reached out to local contacts asking how many members of local groups are also members of E-USA. The response was limited, but

one result was clear: Some local groups have a significant fraction of their members who are also members of E-USA. Other local groups have only one or no members who are members of Esperanto-USA. One problem of course is that the structure of local groups vary greatly and the question of who is a member of a local group often does not have an obvious answer. It was agreed among Regional Coordinators that we need a campaign to get members of local groups to join Esperanto-USA. I discussed this need for this kind of membership campaign with other members of the E-USA Membership Committee. They agreed to take this up as a future project.

— Fred Meyer, III

Board Meeting, January 8th, 2022

Ĉeestas

Kun voĉdonrajtoj: Filipo Dorcas, Alekso Miller, David Beck, Charlotte Burton, Fred Meyer III, Hoss Firooznia, Tim Rice

Sen voĉdonrajtoj: Vilĉjo Harris

Opening

Because the Secretary was absent from the previous meeting, the minutes were not able to be posted and approved in the customary way, so the minutes from the previous meeting and this meeting will be subject to the standard automatic approval process simultaneously after this meeting. Phil motions that it be so. Fred seconds. Unanimously approved.

Reports

Central Office

The land in El Paso has been officially sold, and the income from it has been placed into a separate category and is therefore not reflected in our operational budget. The last winner from the previous film festival has been paid. Discussion arises regarding the bookstore. Alex requests that Bill create an inventory of what items we currently have physically in stock. Bill agrees to do so and clarifies that this will take a few days and will include all items we currently have in stock, including things that he would not likely repurchase if we were to run out. Currently, we tend not to restock books which are also sold by UEA, as we instead allow those items to be fulfilled via the UEA bookstore. If UEA does not stock and item, our bookstore might retain a final copy.

Bill also clarifies that we receive a large number of donations, both in small amounts and large amounts. Julie Spickler has also been sending handwritten notes in response to large donations. We do not know if this is still ongoing, but Bill offers to create a list of those who have made large donations, so that we could send out thank you notes. **Action Items: The Board will review the list of substantial donors and will decide how to thank donors. Action Item: The Board will determine what to do with donations. Action Item: Ask Tim B for a report on the results of the membership drive**.

Treasurer's Report

We had been running about $3000 over budget. Given the recent property sale for about $3000, this could be moved into the general fund, which would help us towards reaching a balanced budget. Phil moves that we move the net proceeds from the sale to the General Fund. David seconds. The motion is unanimously approved. The president points out that, between all our accounts, we do have a great deal of money, though most of it is earmarked to specific funds and/or is being invested, and is only to be accessed in case of dire emergencies, but nonetheless, Esperanto-USA is in no danger of shutting down.

President's Report

Following this meeting, the board will gather to discuss ideas for a road map for the coming year. When that occurs, we would like to gather information for two reports: one very official report for the upcoming UK in Montreal, and another to highlight the accomplishments we have made as an organization over this year. We have accomplished a great many things in 2021, but we have insufficiently communicated these successes to our members. Communication with members must be a priority going forward. This must include two way communication with all members to reach maximal transparency and allow all our members to feel they have "their finger on the pulse of Esperanto in the USA." While Tim B. is not able to be here for this meeting or our roadmap meeting to follow, he has given the board some of his ideas and priorities in Slack, so we will still be able to take his ideas into account. We must be better at delegating tasks and recruiting volunteers, so that we do not burn ourselves out.

Fred asked if we have an estimate of what room rental at the UK will cost E-USA. **Action Item: Phil will submit to UEA a room request for the needed number of rooms for the *Universala Kongreso***.

A proposal was discussed and approved online by the Board of Directors prior to our January board meeting:

> "I move that Esperanto-USA will not use in any of its promotional materials the claim made by Professor Sidney Culbert in 1989 that Esperanto has approximately 2 million speakers. Studies about this topic can be presented in their entirety on our website and other platforms for individuals to carefully evaluate, but we as an organization will not make such estimates

appear more conclusive and current than they are by stating them as simple facts. We require such thoroughness and openness moving forward to ensure that we as an organization be as credible and objective a source of information about Esperanto as possible."

This proposal passed with votes in favor from all nine voting board members.

Board Meeting, February 2nd, 2022

Ĉeestas

Kun voĉdonrajtoj: Filipo Dorcas, Alekso Miller, David Beck, Charlotte Burton, Fred Meyer III, Jane Shevtsov, Tim Rice

Sen voĉdonrajtoj: Vilĉjo Harris

Komencon

La prezidento legas la misian deklaron de Esperanto-USA kaj anoncas kvorumon.

Reports

The following are the regular monthly reports provided to the board:

CO

Nothing notable to discuss. All is going well in the central office.

Treasurer's report

The treasurer discusses the market value change of our investments and states an intent to talk to the appropriate people about diversifying our investments more. Donations began getting active in December and continued into January, thus causing them to be split into the two years. Vilĉjo (Bill) reiterates his intent to pass on information to the board regarding especially large donations, so that we may thank these donors in some additional way. A question arises about the specific purview of various specific reports that the treasurer receives.The latest reports indicate that Esperanto-USA officially ended 2021 having gained a little over $2000, which is largely thanks to generous donations from members and due to having moved the central office to no longer occupy a physical storefront in California, which occurred several years ago.

President's report

The president officially names Charlotte Burton head of the Goldman Fund. This is in order to support the process of managing donations and grants/stipends. The Goldman Fund is officially a non-restricted fund, meaning the board could legally determine where to spend that money, but a fund manager can take precedence in that responsibility. It is requested that the board receive a report at least quarterly from all funds, to keep us informed on any notable expenditures or income regarding any funds. The CO sends the board a quarterly report. The CO and treasurer already send the board a quarterly investment report, which includes information on all funds, plus a further, less official report monthly concerning more minute changes. It is determined that these reports are sufficient to clarify fund status to the board, such that the board is able to keep track of any funds which are their responsibility.

The president moves into a discussion of paper versus electronic media for our bulteno. It is clarified that everyone who has an email address listed with the CO receives an electronic bulletin, but only those with a full membership and who have shown that they prefer a paper bulletin, or those who do not have a listed email address, will receive a paper bulletin. A little over ⅓ of current members receive a paper copy of the bulletin "Usona Esperantisto." **Action Item: Suggest to the Membership Committee the idea of offering "prizes" of some sort to people who purchase higher-level memberships.**

Phil also requests a report from Alekso Miller on what is needed for the next film festival. The upcoming festival is forthcoming, but we are still struggling on publicity for the contest, including a clear rubric, collecting judges, crafting announcements and guidelines, etc. **Action Item: Charlotte will create an announcement, a bulteno article, and a short announcement video announcing that E-USA will be offering up to 100 full youth stipends for the UK in Montreal this year.** It is also discussed whether we should use such software as TikTok or Notion. Discussions on these matters will be moved to Slack for further analysis.

New Business

The CO would like to send out a notice to all members offering to send a UK sticker and postcard if they plan on using them. This is not currently in the budget and would therefore require a board vote for budget approval. This is likely to cost around $60-150. Fred moves that we authorize Bill to spend up to $150 for UK literature. Jane seconds. The motion passes unanimously. An email will be sent out to all members, and Alex will craft a video announcement as well. This will be offered free to members only.

The meeting is officially closed.

Ŝikago, 2001

beletre • Jurij ANDRUĤOVIĈ, Viktor PAJUK

Verkis Jurij ANDRUĤOVIĈ; Elukrainigis Viktor PAJUK.



Jurij ANDRUĤOVIĈ.

Ĉu iam okazis al vi veturi en unu aŭto kun tri Mikaeloj samtempe? Mi unufoje tion spertis, kaj ĝi neforgeseblas.

Ĉe la stirilo sidis la unua Mikaelo – tiu, kiun en ĉi libro mi nomas mmn3. La dua Mikaelo estas aktoro, renoma. En tiu vojaĝo, dum la verkistaj kunsidoj li laŭtlegis fragmentojn el *Perversio*[1], tradukitaj de la unua Mikaelo. Tie ĉi mi nomas lin Miĥal', sed li tamen estas Mikaelo. La tria estas Michael STIPE, ĉefulo de la rokbando R.E.M., ĉeestanta nur kiel voĉo.

Al Ŝikago[2] de nia kara Pensilvanio ni veturis preskaŭ dek horojn. Dumvoje Miĥal kelkfoje anstataŭigis ĉe la stirilo mmn3-on, por ke tiu iom ripozu. Miĥal iel transformiĝis: kapen li surtiris ledan ŝoforan kaskedon, kaj sur la manojn, same ledajn kaj same ŝoforajn gantojn. Mi diras nenion pri la nigraj ŝoforaj okulvitroj, same kiel pri la blanka Isadora[3]-ŝalo – ne nur koltuko, sed vera ŝalego. Tuj fariĝis klare, ke la homo estas sperta kaj ne unufoje sortobatita.

En Ŝikago ni pasigis du noktojn kaj, estinte tute plezurigitaj de tiu fantasta urbo kaj de ni mem, je tagmezo de la tria tago ni ekveturis pluen – al Urbana-Champaign. Rakonto pri ĝi mankas en tiu ĉi libro.

Dank' al mmn3 ni sukcesis pri la loĝejo. Tio estas – pri ĝia troviĝo, en norda Ŝikago, sur strato Dearborne, je kelkaj ŝtupoj de la laga bordo kaj ial meze inter stratoj Goethe kaj Schiller, kvazaŭ ni efektive trovis nin ne en Ŝikago, sed en iu Vajmaro, Dachau aŭ Eisenach. Finfine, eĉ numero de la domo, kie ni tranoktis, estis diversflanke atentinda: 1331.

Kaj jen de tie, de la ĉefpordego de la domo n-ro 1331, kiu je la tagmezo de la tria tago mmn3 stiris nian pruntepreniten *Ford Cherokee*, al Urbana-Champaign estas nur de 140 ĝis 160 mejloj, t.e. du kaj duono – tri horoj da veturado, ĉiam suden, kaj iom okcidenten. Kaj ĉar nia sekvanta Perversio-spektaklo devos komenciĝi en la menciita Urbana je la sesa vespere, ni povis permesi al ni luksaĵon: eki ne pli frue, ol la unua. Ni faris tiel. Kurante antaŭen, mi diru, ke se ni estus ekveturinta duonhoron pli frue, ĉi rakonto ne aperus.

Sed dekomence ĉio okazis tute ne malbone. Ni forveturis, kiel devas esti, en direkton de *Lake Shore Drive* kaj ekis suden je sonoj de radio-ricevilo. Tiun tagon radiostacio informis ĝenerale pri du eventoj: pri tio, ke Slobo MILOŜEVIĈ, subite kaptita en anticipe donita al li loĝejo, estis finfine fordonita de jugoslavoj al Okcidento; kaj pri eldono de la nova unukanta disko de R.E.M. – *Imitation of Life*. De tiu momento en la aŭto aperis la tria Mikaelo – tio estas, la voĉo de la tria Mikaelo. Mi memoras, kiel min ĝojigis ambaŭ novaĵoj. Kvankam la dua tamen pli, ĉar proksimiĝis apero de la nova R.E.M.-a albumo *Reveal*. Ni rapidis per aŭto laŭlonge de lago Miĉigano, printempo jam estis transpasanta la mezon de Marto, kaj ĉiuj radiostacioj elsendis *Imitation of Life* ("Imitadon de vivo"), tamen de parolist-anoncoj mi ŝajne aŭdis "Invitadon al vivo"[4] – nu, vere, sen Antoniĉ okazas nenio. Nome la vivo invitis min kaj ĉiujn vivi plu.

Se vi delonge ne aŭskultis aŭ ne memoras ĉi kanton, nepre reaŭskultu ĝin. Dum ĝia sonado mi preskaŭ saltis sur la malantaŭa sidloko de tiu buseto.

Antaŭ la elirejo al Sankta Luiso ĉio estis ne tre malbone, kvankam ni devis esence malrapidiĝi pro neatendite densa trafiko survoje. Kaj kio tuj kaptis

mian atenton – estis eĉ pli multaj veturiloj renkontotaj – ili vere rampis. ”Dio, ne permesu al oni trafi tiun obstrukcon”, – kvazaŭ antaŭvidis Miĥal’. Post proksimume unu mejlo ni devos preni alian elirejon, al Indianio kaj iri en aŭtovojon 94, de kiu baldaŭ eliri iomete dekstren sur aŭtovojo 57, kaj poste plenrapide traveturi cent dudek mejlojn antaŭen al elirejo por Urbana. Kaj ĝuste tie oni per radio elsendis urĝan anoncon, ke ĉiuj elirejoj de vojo 94 proksime de strato 95 estis blokitaj lige kun batala operacio de ŝikaga polico por neŭtraligi nekonatan kaŝpafiston, pafantan de sur tegmento de unu alta konstruaĵo en la najbareco de avenuo Perry kaj strato *La Salle*. La anonco ripetiĝis denove – kaj tiel klare, ke ni preskaŭ ekaŭdis kuglan fajfadon eksterfenestran. Post tio denove eksonis *Imitation of Life*, ĉi-foje iom pli drame ol antaŭe.

Pri kio temas ĉi kanto? Pri la malpleno de la ekstero? Kion Michael Stipe volis diri per tiuj ”ŝaradoj”, ”akvaj hiacintoj”, ”sukerkanoj” kaj ”holivudoj”? Kion li atentis per ”cinamo”? Mi ne entreprenas interpreti tiun verson, eĉ se ĝi sonis dekojn da fojoj en nia aŭto tiutage, kaj mi eĉ povis ripeti de tempo al tempo *“c’mon c’mon no one can see me cry”*. Ne, mi entreprenas interpreti ĝin, malgraŭ tio, ke tiu poemo – aŭ pli ĝuste, tiu kanto – nekredeble bone koincidis kun la situacio: Usono, aŭtovojoj, Ŝikago, freneza kaŝpafisto pafanta aŭtojn de ie, Marto, suno, ŝaradoj, akvaj hiacintoj, japanaj karpoj, orfiŝoj en basenaj bovlegoj, arestita Miloŝeviĉ.

Montriĝis, ke ni devos reveni al sankta-luisa elirejo kaj iri al aŭtovojo 55 anstataŭ 94. Tio plilongigos nian vojon je entute dek kvin mejloj, sed pli grave, devigos nin turniĝi kaj rampi en la ĝenerala fluo kun rapideco de ne pli ol duonmejlon hore. “Kaj urĝe ekdeziris tiu idioto pafi ĝuste hodiaŭ!”, koleris mmn3. Mi supozis, ke ĉio okazis pro ni, kiel citaĵo el *Perversio*, Stas Perfeckij kun sia fosilo elakviĝis en Ŝikago. Miĥal’ proponis ĉe la unua eblo eskapi de la ŝoseo kaj iri tra la urbo. Hezitante, mmn3 akceptis la proponon. Ja Miĥal’ estis la plej sperta kaj lerta inter ni ĉiuj.

Kaj tiel samtage ni, iom post iom pli malorientiĝintaj, ankoraŭ kelkajn horojn ĉirkaŭiris tra la urbo Ŝikago. Sed ne tra tiu kaj tia, kiun ni satrigardis en la apudlagaj distriktoj en la nordo. Ĉar tiu ĉi estis alia, terure alia urbo. Mi pensas, ke ni transiris Englewood-on: kadukaj aŭ tute forlasitaj domoj, dezertejoj kun montoj de elŝutita rubo, maldikaj aŭ, male, dikegaj homoj, kiuj simple sidis aŭ kuŝis sur trotuaroj, verandoj kaj peronoj, simple sidis, simple kuŝis, simple mortis. Nu, bone – kelkaj el ili ankoraŭ penis almozpeti de ŝoforoj ĉe trafiklumoj. Aŭ ludis basbalon sur krevinta asfalto. Ne necesas diri, ke ili ĉiuj havis nigran haŭton. Laŭ oficiala statistiko, en Englewood, 98 elcentoj de la loĝantaro estas nigruloj kaj 0,44 elcentoj – blankuloj. Mi ŝatus rigardi tiujn blankulojn! Ĝi ne estis Ŝikago, ĝi estis, ekzemple, Najrobo.

Ĝi estis vivo, ne, ne imitado, ho ve, sed ĝi estis vivo – malmola kiel basbalbatilo, nigra kiel nokto en plena taglumo kaj, kiel narkotilo, senkompata kaj deloga.

Ni alvenis al Urbana-Champaign je horo kaj duono malfrue.

❧ ❧ ❧

Pri la aŭtoro

Jurij Andruĥoviĉ (n. 1960) estas populara ukraina verkisto kiu doktoriĝis (1994) pri verkaro de B.-I. Antoniĉ.

Leksikono de intimaj urboj estas lia kolekto de 111 noveloj-eseoj pri diversaj urboj de la mondo. Laŭ li, temas pri libro-puzlo, kie la nomoj de urboj estas nomoj de ĉapitroj, konsistigante multnivelan verkon – alivorte, “romanon kun geografio”. Ĉi tiu rakonto rezultis de lia vizito al Ŝikago en 2001.

1. Nomo de romano (1996) de J. Andruĥoviĉ.
2. En PIV, la nomo aperas kiel *Ĉikago*.
3. Aludo al Isadora Duncan (1877–1927) – usona, angla, rusa dancistino, edzino de fama rus-sovetia poeto S. Jesenin. Dum aŭto-veturo ŝi estis sufokita per sia ŝalo.
4. Aludo al poemaro de Bohdan-Ihor Antoniĉ (1909–1937) *Saluto de Vivo* (1931).

Ŝanĝo (aŭ ĉu sango?) en Portugalujo

vojaĝe tra la mondo • Brandon Sowers

En Oktobro mi estis en Porto, Portugalujo kaj promenis iun sabaton kun du lokaj esperantistoj. Ni trovis foiron kun diversaj metiistoj kaj etvendistoj. Dum miaj amikoj babilis kun konato, mi rondiris kaj okulumis la aliajn giĉetojn. Ĉe unu oni vendis diversajn ledaĵojn, inter ili monujojn. Tio efektive interesis min, ĉar mi sentis ke mia tiama monujo ne plu taŭgas; mi volis ion tre malgrandan, kiu tamen ankaŭ entenu monerojn. Malgraŭ mia emo kiel vegano eviti ledon, estis io pri la monujoj, kiu tentis min ĵeti pli proksiman rigardon.

Imagu mian surprizon, kiam mi vidis skribitajn sur la giĉeto la literojn "SANGO". *Ĉu estas mia konscienco, riproĉante min pri la besta sufero? Ne, hodiaŭ mi ne kredos ke tiaj koincidoj portas veran signifon.*

Mi proksimiĝis ĝis estus embarase, se aŭ mi aŭ la vendistoj ne parolus. Estis duopo: la viro ne atentis min, sed la virino kapklinis salute.

"Saluton," mi respondis portugale, "bonan vesperon", kaj mi proksimiĝis pli por vidi la diversajn kreaĵojn, kiujn ili ofertis. Mi komencis per la monujo, kiu jam kaptis mian atenton. Estis kelkaj en belaj klasikaj koloroj kiel kastaneo, kaj mi rimarkis, ke estis skribita sur ili la vorto "VENKO". *Kurioze*, mi pensis, *alia esperanta vorto*. Mi rigardis aliajn aferojn. Jen pli minimumisma monujo (kartujo, vere) kun la nomo "KARDO". Jen ilo por porti ŝlosilojn: "RINGO". Jen pasportujo: "FLUGI".

"Pardonu," mi diris, "sed ĉu vi scias, ke la nomoj de viaj varoj estas vortoj en la internacia lingvo Esperanto?"

"Jes," respondis la virino, "tio estas intenca. Ni elektis de Esperanto ankaŭ la nomon 'Ŝanĝo' por nia firmao." (Tiam mi komprenis, ke mi mislegis: mi pretertrafis la ĉapelojn sur la nomo. Mia konscienco pli trankviliĝis.)

"Ho, ĉu vere? Mi parolas Esperanton, kaj mi estas ĉi tie kun du aliaj esperantistoj."

Ŝi indikis, ke ŝi neniam antaŭe renkontis iun, kiu eĉ sciis pri Esperanto aŭ rekonis la vortojn.

Tiam mi sciis, ke mi estis morale devigata aĉeti ion de ili. *Mi ne povos esti la unua esperantisto*, mi pensis, *kiu trovos ilian giĉeton, kaj foriros senaĉete. Kion ili pensus pri nia komunumo?* "Kion vi povas diri pri la monujo?"

"Jes!" Ŝiaj okuloj montris ekscitiĝon. "Ni nomis ĝin 'Venko' ĉar ni dum longa tempo provis diversajn manierojn krei malgrandan monujon, kiu tamen akceptu monerojn." Ŝi enmanigis ekzempleron kaj malfaldis ĝin diversmaniere, por montri la spacojn por kartoj, por moneroj, por biletoj.

"Bone. Mi aĉetos unu, tabakbrunan mi petas." Kaj mi transdonis miajn eŭrojn, ricevis mian VENKON, dankis. Mi provis paroligi miajn amikojn al la vendistoj, sed komencis pluvegi. Devos esti alia tago, sed tiu tago ĝis nun ne venis.

Kaj mi efektive iom forgesis pri Ŝanĝo ĝis antaŭnelonge, kiam, dum vespermanĝo kun mia fratino, ŝi menciis, ke ŝi aĉetis tre ŝikan monujon por mia bofrato kiel kristnaskan donacon. Ĝi povis akcepti monerojn – unu el liaj bezonoj. Ĉu mi volis rigardi? Imagu mian surprizon, kiam ŝi elsakigis malgrandan keston kun la vorto "ŜANĜO" (kun supersignoj), kvankam mi ja iom anticipis.

Kristnaske, kiam li malfermis la keston, estis klare, ke mia VENKO ne estos la fina. Kaj mi esperas, ke ankaŭ lia ne estos.

Pli da informo pri ŜANĜO vi povas trovi ĉe ĝia **retejo** `<https://sango.pt>` kaj **Instagram-paĝo** `<https://instagram.com/sangohandmadecreations>`. Rigardu kaj ĝuu!

Brandon Sowers

Brandono estas usona esperantisto de Atlanto kiu loĝas lastatempe en Porto, Portugalujo.

<**bsowers@protonmail.com**>

Eĉ naturaj lingvoj povas esti planitaj

informado • Joshua HOLZER



Paĝo el la lernolibro *Yeni Harflerle Resimli Türkçe Alfabe* (1928), de Ibrahim HILMI. Ĝi instruis la modernan turkan alfabeton al tiamaj parolantoj de la otomana turka.

Kiam mi ekkomencis studi Esperanton, la jena demando kelkfoje leviĝis al mi: "Kial lerni planlingvon, kiam vi povas uzi tiun tempon por lerni lingvon naturan?" La problemo en tiu demando estas, ke lingvoj povas esti kaj naturaj kaj planitaj: la trajtoj "natura" kaj "planita" ne estas reciproke ekskluzivaj.

Ekzemple, ekde 1635, la *Académie Française* gvidas la francan lingvon. Ĝi oficiale havas aŭtoritaton pri la vortprovizo kaj gramatiko de la franca. Laŭ **artikolo XXIV** <https://bit.ly/3IE1hHb> de la akto, kiun establis la *Académie*, ties ĉefa funkcio estas "labori kun ĉia zorgo kaj diligenteco por doni certajn regulojn al [la franca lingvo] kaj fari ĝin pura, elokventa, kaj kapabla pritrakti la artojn kaj sciencojn." Tiucele ĝi publikigas la **oficialan vortaron** <https://academie.atilf.fr/9/> de la franca. Por reteni la francan "pura", la *Académie* malinstigas uzon de pruntvortoj, kaj anstataŭe instigas adopton de neologismoj.

La *Académie Française* ne estas la unua lingva akademio de tiu speco. Fakte, ĝia modelo estis la ***Accademia della Crusca*** <https://bit.ly/3MiulX3> kiu fondiĝis en 1583 kaj helpis normigi la italan lingvon. En la itala, *crusca* signifas branon. La nomo implicas ke la akademio disigas tritikon disde sia brano – aŭ pli ĝuste, la dezirindajn partojn de la itala lingvo disde siaj nedezirindaj partoj. La simbolo de la asocio estas faruna muelilo; la faruna pureco estas metaforo por lingva pureco.

La serĉado de lingva pureco povas iafoje konduki al vastaj ŝanĝoj. Ekzemple, ekde la starigo de moderna Turkujo, la turka lingvo spertis grandan reformon. Oni anstataŭigis multajn arabajn kaj persajn pruntvortojn uzitajn dum la otomana periodo per vortoj turkdevenaj.

Fakte, tiom da novaj vortoj estis adoptitaj, ke junaj turkoj nun malfacile komprenas la lingvon, kiun oni parolis nur 100 jarojn antaŭe. En la lastaj jardekoj, fama parolado el 1927 de Mustafa Kemal ATATÜRK (la unua prezidanto de Turkujo) devis esti "tradukita" en la modernan turkan por ke oni povu kompreni ĝin. Eĉ la titolo de la parolado ŝanĝiĝis! (Antaŭe nomita *Nutuk*, ĝi nun estas konata kiel ***Söylev*** <https://amzn.to/3sI24Bt,>.)

Foje la celo de lingvoplanado ne estas nepre pureco, sed male, por unuigi parolantojn de malsamaj gepatraj lingvoj. Ekzemple, en Indonezio, centoj da lingvoj estas parolataj tra miloj da insuloj. Por unuigi tiun diversan landon, la registaro estis longe antaŭeniginta la uzon de la indonezia, bazita je normigita versio de la malaja (kun multe da nederlandaj pruntvortoj kaj malsamaj literumaj reguloj). Kvankam la indonezia ne estas la plej vaste parolata gepatra lingvo en la lando, ĝi funkcias kiel nacia interlingvo, **kiu ekzistas apud lokaj lingvoj** <https://bbc.in/3pzKq0E,>.

Estas malfacile argumenti, ke la franca, la itala, la turka, kaj la indonezia estas tute naturaj, ĉar ili (kiel multaj aliaj lingvoj) estis influitaj tra la jaroj de lingvaj akademioj. Kvankam Esperanto havas la Akademion de Esperanto, la evoluo kaj disvastigo de la lingvo ne estas rezulto de la forto kaj volo de lando aŭ landoj. Eble tio signifas, ke Esperanto estas vere pli natura ol multaj "naturaj" lingvoj, kiuj disvolviĝis pro subteno de potencaj registaroj.

Do se homoj demandas, kial vi lernas planlingvon anstataŭ "natura" lingvo, eble informu ilin, ke eĉ "naturaj" lingvoj povas esti gvidataj de zorga planado. Kaj diru cetere, ke la uzado de planlingvo povas esti

tute natura afero por ĝiaj parolantoj.

Estas nature voli lerni lingvojn por pli bone interkomunikiĝi. Do se Esperanto povas faciligi interkomunikiĝon, ĉu ne estas nature voli lerni ĝin?

Joshua Holzer

Joshua estas asistanta profesoro ĉe Westminster College (en Fultono, Misurio) kie li instruas politikan sciencon.

<**josh.holzer@westminster-mo.edu**>

Bimonthly expense report

de la centra oficejo • Vilĉjo Harris

For brevity, only expenditures of $10 or greater are listed. Contact the Director of the CO at info@esperanto-usa.org if you have suggestions for making future reports more informative. Please note that expenses from our **Restricted Funds** <https://bit.ly/3lzLlLK> are **not** determined by the CO, and all questions regarding these funds should be directed to their respective managers.

DATE	PAYEE	AMOUNT	ACCOUNT	MEMO
2021-12-03	BOA CC 7572	11	Internet Access	Dreamhost
2021-12-03	BOA CC 7572	20	Internet Access	ttt website (vultr)
2021-12-03	BOA CC 7572	27	Telephone/Fax	800 number
2021-12-03	BOA CC 7572	27	Telephone/Fax	AT&T
2021-12-03	BOA CC 7572	40	Credit Card Expenses	Payflow
2021-12-03	BOA CC 7572	104	Office Expenses	backup (rsync.net)
2021-12-06	RAND PRINTING	53	Member Mailing Expenses	paper signups
2021-12-07	ENDICIA	65	Member Mailing Expenses	Endicia stamp sheets
2021-12-07	ENDICIA	300	Catalog Service Postage	postage
2021-12-07	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2021-12-13	Federal & State Payroll Taxes	186	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2021-12-13	Federal & State Payroll Taxes	716	Salaries	Employee taxes
2021-12-13	HARRISWB	1715	Salaries	payroll
2021-12-15	ADP	55	Payroll Fees	fees
2021-12-15	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2021-12-20	VIDEO WINNER	150	Goldman Fund Expenses	Sergio Rusaki - Winner - Esperanto Film Festival 2
2021-12-31	PAYPAL	286	Credit Card Expenses	Fees
2022-01-04	RAND PRINTING	222	Bulteno - Print & Post	UE 2021:5
2022-01-05	ENDICIA	13	Office Expenses	stamps for the office
2022-01-05	ENDICIA	136	Prepaid Expenses	stamps for future large-envelope mailing
2022-01-05	GRUBB & ELLIS MGMT. SERV	238	777 Fund Expenses	Esperanto Office- Desk Space C-D4
2022-01-05	USPS	59	Free Postal Course Expenses	stamps
2022-01-05	USPS	59	Member Mailing Expenses	stamps
2022-01-06	ENDICIA	91	Bulteno - Print & Post	stamps for UE 2021:5
2022-01-10	DELAWARE, State of	25	Licenses/Permits/Taxes	corp tax
2022-01-13	Federal & State Payroll Taxes	232	Payroll Tax Expense	Employer taxes
2022-01-13	Federal & State Payroll Taxes	709	Salaries	Employee taxes
2022-01-13	HARRISWB	1722	Salaries	payroll
2022-01-14	ENDICIA	16	Catalog Service Postage	monthly charge
2022-01-18	UPS	558	Office Expenses	mailbox - 1 yr
2022-01-21	ADP	55	Payroll Fees	fees
2022-01-21	ADP	61	Payroll Fees	year end fees
2022-01-31	PAYPAL	267	Credit Card Expenses	Fees

Mikronoveloj

Mikronoveloj estas ege koncizaj rakontoj, ofte malpli ol 300 vortojn longaj. Por nia mikronovelo-rubriko ni aldonas kroman defion: rakontoj devas esti precize 100 vortojn longaj – nek pli, nek malpli. Ĉu vi emas verki tiel? Sendu viajn centvortaĵojn al la redakcio (trovu la adreson en la kolofono), kaj eble ili aperos en venonta numero!

Testudosupo

Patrino neniam lernis konduki aŭtomobilon, do ni manĝadis testudosupon.

Mi klarigu: Dum kondukleciono, Patrino surveturis ies poŝtkeston, do ŝi ne provis konduki plu. Sed la bonkoraj posedantoj, biengeestroj George kaj Opal, iĝis vivdaŭraj geamikoj.

Ili proponis prizorgi niajn anasojn, ĉar patro timis, ke oni surveturos ilin en la proksima vojo. Estante en la fora biena lageto, ili devis resti sekuraj.

Sed George diris, ke ili malaperis! Poste, li alvenis kun granda anasmanĝinta akva testudo, kiun li pafis. Avo fortranĉis la ŝelon, kaj avino kuiris la karnon kun ĝardenaj legomoj, hermetikigante la supon, kiun ni manĝadis ĉe niaj dimanĉaj familiaj vespermanĝoj.

— *Mark Hamme*

Vortoj ne mortigas



Oni taksis la film-kritikiston Marko Alue “ĉikanema”, “senkompata”, kaj eĉ “malica”. Li certe ne taksis sin tia, sed ja “aglo-okula”, “postulema” kaj super ĉio, “honesta”. Ne estas lia problemo, se li devas ĉiam rimarkigi memevidentajn erarojn en la recenzataj filmoj: se ili estus pli bone faritaj, li trovus malpli da kritikendaĵoj. Ajnokaze, vortoj ne mortigas.

Li surpriziĝis kiam reĝisoro de lastatempe akre kritikata filmo furioze eniris lian oficejon, energie postulante, ke Marko publike malkonfesu sian kondamnon, kiu perdigis al lia filmo monon kaj al li lian reputacion.

Necedeme neinte, Marko subite malkovris, ke kvankam vortoj ne mortigas, pafiloj jes ja.

— *Jorge Rafael Nogueras <rafaeln@alum.mit.edu>*

La vivo de Peĉjo

Ŝercoj • Timothy Boronczyk



Teksto kaj ideo de Timoteo; desegnaĵoj de “Awesome Satyr”. (Kaŝnomo, kompreneble. Timoteo klarigas, ke la artisto preferas resti anonima.)

Raporto de la meza regiono

Virtuala Bankedo en Sankta-Luiso

loke • Peggy DOLTER



En Decembro 2021 nia klubo en Sankta-Luiso okazigis virtualan bankedon. Mankis al ni vespermanĝo, sed ne mankis al ni gastoj kaj interesaj konversacioj. Kvin partoprenintoj loĝas en la regiono de Sankta-Luiso, kaj kvin loĝas en aliaj urboj kaj eĉ en foraj ŝtatoj.

Je la komenco ni spektis *Ho Zamenhof, vi foras nun*. Ni dankas al Thomas ALEXANDER, kiu kantis kaj afiŝis ĝin en YouTube, kaj ni dankas al David JORDAN, kiu verkis la vortojn, inter aliajn amuzajn kantojn por zamenhofaj bankedoj.

En nia tre bonŝanca klubo, unu membro estas Duncan CHARTERS, akademiano kaj la prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio. Li resumis por ni la staton de la UEA. Ĉu vi, leganto, planas ĉeesti la Universalan Kongreson en Montrealo, de la 6-a ĝis 13-a de Aŭgusto?

Ni ĝojis gastigi s-inon Charlotte BURTON, kiu estas – eble vi jam bone scias! – Sekretario de Esperanto-USA. Ŝi komplezis al ni kaj faris resumon pri Esperanto-USA.

Skeĉon laŭtlegis nia gasto Anna BENNETT kaj mi. Tiu estis *Li volis fariĝi aviadisto*; ni trovis ĝin en *Facila skeĉalbumo* de Bertram POTTS (1895–1994).

Ni spektis kanton de Yves DESROSIERS: *Noktaj pensoj*, kaj finfine, salutojn de esperantistoj tra la mondo en YouTube: *Esperanto, la lingvo de unueco – Zamenhofa Tago 2021* – tre taŭga fino.

Estontaj eventoj troviĝas ĉe **nia paĝo en Weebly** `<https://esperanto-stl.weebly.com/events.html>` … kaj ĉiuj estos bonvenaj!

Esprimoj kun redundaj, superfluaj sinonimoj

traduku! • Hoss Firooznia

La rubriko *traduku!* prezentas al vi diversajn tradukdefiojn. En paraj numeroj aperas tekstoj en Esperanto por enangligi; en neparaj, tekstoj en la angla por elangligi. Leginte viajn respondojn, ni prezentos resumon de la diversaj proponoj kune kun niaj reagoj, komentoj, kaj proponoj.

En № 2021:5 ni prezentis fragmenton el *Transience* de Arthur C. Clarke. Unuflanke, la defio estis pli facila ol kutime, kun tradicia lingvaĵo sen strangaj blasfemoj aŭ modaj idiomaĵoj. Aliflanke, Clarke elvokas nuancajn sentojn per sia majstra uzo de la angla, do malantaŭ la ŝajne facila supraĵo atendis pluraj kaptiloj …

Numero de *Startling Stories* (Julio, 1949) en kiu unue aperis la novelo *Transience* de Arthur C. Clarke.

Partoprenis ĉi-foje nur kvar tradukantoj, sed ili ĉiuj prezentis tre imponajn proponojn; evidentiĝas, ke ili zorge meditis pri sia laboro. Gratulon kaj dankon al BA, BS, DH, kaj MH.

Rimarkindaj vortoj kaj frazoj

the beach — Du tradukintoj elektis *plaĝo*, la aliaj du *strando*. En kutima uzo la du vortoj estas efektive sinonimoj, sed laŭdifine ili subtile diferencas. *Strando* havas la pli vastan sencon; ĝi nomas sabloriĉan akvobordon taŭgan por sun- aŭ akvo-banado. *Plaĝo* estas pli specifa; ĝi nomas strandospecon intence aranĝitan por feriantoj. Do ĉiu plaĝo estas strando, sed ne ĉiu strando estas plaĝo. Kaj supozeble neniu en pratempa sovaĝejo aranĝas strandojn por feriantoj.

misty hills — Tri el la tradukintoj redonis *montetojn nebulajn*, kaj unu *nebuletajn*. Interese, en siaj elangligoj de Tolkien[1], William Auld kutime preferis *nebuleca*. Eble li opiniis la vorton *nebula* ne sufiĉe klarsenca. Laŭ PMEG[2], *-ec* kun a-finaĵo signifas “simila, samaspekta kiel”, do eble la ĝusta elekto dependas de tio, kial oni nomas aferon *misty*: ĉu pro tio, ke ĝin ofte akompanas nebulo (do *nebula*), aŭ ĉu pro tio, ke ĝi aspektas neklara kiel nebulo (do *nebuleca*)?

here and there — Oni proponis *kelkloke* kaj *tie kaj tie*. Aliaj ebloj: *jen kaj jen*; *dise*; *ie-tie*.

the tide left long streamers of weed trailed across the beach — Ĉiu propono montris interesajn ideojn. BA lerte redonis la simplan *forlasis longajn striojn de algo sur la strando*. DH faris preskaŭ tutsame, sed kun *striojn de algo drapiritajn*, kiu bone elvokas la originalan bildon. Kaj BS proponis la verbon *postlasis*, kiu ŝajne kaptas la ideon de *trailed* iom pli klare ol *forlasis*.

Tiu *weed* ĉi tie ne estas *herbaĉo* aŭ *trudherbo* (kiu ĝi ja estus en kunteksto de ĝardeno aŭ gazono), sed speco de *(mar)algo*. Ĉu *algo* estas tamen tro vastsignifa? Clarke povintus uzi la samsignifan anglan vorton *algae*, sed li ne faris – eble ĉar ĝi bildigas ne nepre longajn ruband-formajn vegetaĵojn, sed ankaŭ estaĵojn pli ŝlimajn kaj senformajn. (Cetere, iuj algoj, ekz. *blualgoj*, estas eĉ ne vegetaĵoj, sed bakterioj).

Ekzistas en Esperanto *laminario*, kiu nomas brunalgon kun karakterize longaj platoj (*kelp*, angle). Ĉu tro faka vorto?

ever and again — Oni proponis: *de tempo al tempo*; *foje*; kaj *tempaltempe*.

large, angry drops would beat tiny craters in the sand — Denove oni elpensis interesajn metaforojn. Por BS, *gutoj stampis etajn kraterojn en la sablon*; por DH, la gutoj ne stampis, sed *boris*. Kaj BA redonis la koncizan frazon *pluveroj bate markis la sablon*.

Kelkaj priskribis la pluverojn tre fidele, elektante la adjektivon *koleraj*. Sed ĉu ili tradukis *tro* fidele? Mi ne scias. Kiel anglalingvano, mi foje hezitas tro laŭvorte peri metaforojn el mia gepatra lingvo pro risko, ke la rezultoj ŝajnas memkompreneblaj nur pro lingva interfero. Ĉu en la literaturo de Esperanto ekzistas kutimo priskribi senvivajn aferojn per

kolera? (Ne temas pri retorika demando; se vi konas – aŭ trovos – ekzemplojn, bv. sciigi min.) Eble sentante tiun saman heziton, DH anstataŭe elektis *fortaj*.

Kontraste, la vorto *furioza* estas jam kutime uzata en tiu maniero: laŭ PIV, furioza objekto "efikas kun senbrida perforto" – do ekzemple *furioza vento* aŭ *ŝtormo*.

it was hot and sultry — *varmege kaj malseke*; *varme kaj humide*; kaj *sufoke varme*.

the war between sun and rain was neverending — Ĉiuj prave priskribis la batalon per *senĉesa*, sed leviĝas stila demando: en la antaŭa frazo jam aperas *ceased* – kiun ĉiuj jam redonis per la radiko *ĉes-*. Anglalingvaj verkistoj multe penas eviti tian ripetiĝon, eĉ se temas pri nur similsonaj vortoj. Ĉu oni faras (kaj faru) same en Esperanto? Ŝajne ne – aŭ almenaŭ ne same diligente. Cetere, nia relative konciza radikaro ofte devigas nin reuzi la samajn radikojn. En tiu ĉi okazo, tamen, ni havas bonajn alternativojn, interalie *eterna* kaj *senfina*.

trees grew everywhere, softening the contours of the land — du tradukintoj redonis la esprimon pli-malpli laŭvorte: *moligante la konturojn*; *igante la konturojn ŝajni pli molaj*. La aliaj du redonis la saman ideon alivorte: *glatigante la terkurbojn*; *mildigante la formon de la tero*.

bare, uncovered rock — Por krei retorikan efikon en la angla, oni foje listigas redundajn sinonimojn – *"free, gratis and for nothing"* kaj simile. La samspecan emfazon mi foje rimarkas en Esperanto, sed ne same ofte, ŝajne. Du el niaj tradukintoj redonis neredundajn priskribojn: *nekovrita roko* kaj *nudaj rokoj*. La aliaj du imitis la originalan stilon per *kalva, malkovrita* kaj *nekovrita, elstaranta*.

the sky line fell sharply away — Tri provis kapti la metaforon per *la horizonto forfalis*; *la rando de la ĉielo subite malsupreniĝis*; kaj *la horizonto forte deklivis*. Unu elektis revortumi pli simple kaj koncize, sed iom malpli suke: *kreiĝis klifo*. Kion vi opinias pri *la horizonto abrupte fordeklivis*?

drooping down to the sea like a broken wing — Preskaŭ ĉiuj redonis la komparon *kiel rompita flugilo*. Okazis tamen malkonsento pri *drooping down*: *malleviĝante maren*; *velkante maren*; kaj *direktiĝante sin ĝismaren*. En la angla, *to droop* povas signifi *"to hang (downward)"*, do kion vi opinias pri *pendante*?

moving with the cautious alertness of a wild animal — Denove Clarke utiligas parte redundajn sinonimojn por krei emfazon. BA, strebante kiel kutime al eleganta klareco, redonis *irante atente kiel sovaĝa besto*. Simile faris MH: *movante kiel atentega sovaĝa besto*. La aliaj restis pli proksimaj al la Clarke-a stilo: *moviĝante kun la zorgema atento de sovaĝa besto* (BS) kaj *moviĝante singarde kaj atente kiel sovaĝa besto* (DH).

stunted trees — La tradukintoj redonis arbojn *malgrandajn*, *nanajn*, kaj *nanigitajn*.

[his brutish face] might have almost passed in human society — *preskaŭ akceptiĝus en homa socio*; *preskaŭ povus aspekti homa inter homoj*; *preskaŭ povus taŭgi homsocie*; *estis best-simila sed apenaŭ rimarkeble*.

the eyes would have betrayed him — Tri tradukintoj elektis la verbon *malkaŝus*; unu revortumis la saman ideon per *liaj okuloj klare estis nehomaj*. Ambaŭ aliroj bone funkcias laŭ mi, sed ekzistas alia, eĉ pli rekta eblo: la pli laŭvorta *perfidi*. Laŭ PIV, *perfidi* signifas "malkaŝi, konatigi ion, kio devis resti sekreta".

La "sinteza" traduko

Jen provo krei sintezan tekston uzante la proponojn de niaj tradukintoj kun kelkaj aldonoj.

> La arbaro, kiu preskaŭ atingis la strandon, iris supren en la malproksimon laŭ la flankoj de malaltaj, nebulecaj montetoj. Subpiede la sablo estis malfajna kaj miksita kun miriadoj da rompitaj konkoj. Ie-tie laŭ la strando kuŝis longaj laminarioj, postlasitaj de la retiriĝinta tajdo. La malofte ĉesanta pluvo estis pormomente enlanda, sed, de tempo al tempo, grandaj, furiozaj pluveroj faris krateretojn en la sablon.
>
> Estis sufoke varme, ĉar la milito inter suno kaj pluvo estis senfina. Arboj kreskis ĉie, mildigante la konturojn de la tero, tiel ke la montetoj glate kunfandiĝis. En nur unu loko videblis kalva,

malkovrita roko, kie antaŭlonge iu faŭlto malfortigis la fundamentojn de la montetoj; tie la horizonto abrupte fordeklivis tra mejlo aŭ pli, pendante ĝismaren kvazaŭ rompita flugilo.

Moviĝante kun la singarda atento de sovaĝa besto, la infano venis el la arbaro tra la malaltaj trunkoj ĉe ĝia rando. Lia vizaĝo, kvankam bruta, ŝajnus preskaŭ normala en socio homa – tamen la okuloj perfidus lin.

Por tiuj, kiuj volas kompari la tradukojn kaj vidi ĉiujn detalojn, en la reta versio de la artikolo vi trovos paralelan prezenton de la proponoj.

❧ ❧ ❧

La nova defio

Novaj defioj ne venos ĝis aŭtuno (pardonon!) sed venontnumere aperos rezultoj de la defio en № 2021:6.

Piednotoj

1. **Sezonoj: *Tolkien en Esperanto***
   <https://esperanto-ondo.ru/Ind-jrrt.htm>
2. **PMEG pri *-ec* kun a-finaĵo**
   <https://bertilow.com/pmeg/vortfarado/afiksoj/sufiksoj/ec.html#i-7do>

Kolofono

Redaktoro/Editor: Hoss Firooznia

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CMC #271205, University of Rochester
500 Joseph C. Wilson Blvd.
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Artikoloj estu inter proks. 500–1500 vortojn longaj. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kune kun via nomo, adreso kaj foto. Kun ĉiuj aliaj fotoj bonvolu sendi informon pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Ni resendos poŝte ricevitajn materialojn se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

La enhavo de *Usona Esperantisto* estas havebla laŭ la permesilo CC BY-SA 3.0 <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed.eo>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre reprezentas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj bv. legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.

❧ ❧ ❧

Usona Esperantisto (“American Esperantist”) is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; preferred length for an article is between 500–1500 words. Please send materials by email if possible and include your name, address, and a close-up photo. With other photos please include the name of the photographer along with subject(s), location, and date. We will return contributions received by postal mail if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons license BY-SA 3.0 <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>. As a courtesy, we ask that you wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors should consult the deadline calendar and style guide on our website.